

ESPERANTO*INFO

*Informilo de Kataluna Esperanto-Asocio

Novaj asocioj naskiĝas ĉirkaŭ ni, ekster Kataluna Esperanto-Asocio, sed kie membroj niaj agadas. Tiuj asocioj forte komplementas nian agadon, kiu ĉi-jare malkreskis. Menciindas la Asocio de amikoj de la Muzeo de Subirats, kies agado estas ege fruktodona, kaj Esperantistes per la Independencia, faka sekcio en Nacia Kataluna Asembleo, kiu alportis la lukton por demokratia interkomunikado en en tiun movadon por la sendependiĝo de Katalunio.

Sed mi aparte salutu ĵusbakitan asocion, kreitan de junaj valenciaj esperantistoj tre entuziasmaj. Ĝi fondiĝis en la pasinta renkontiĝo en Oliva (Safor), sed jam videblas intensa kaj fruktodona agado.

Ni, do, bonvenigu Valencian Esperanto-Asocion en la monda esperantomovado, kaj ni subtenu ties agadon.

Ferriol Macip

KATALUNAJ ESPERANTISTOJ FESTAS LA JARFINON EN JES

Kelkaj barcelonaj esperantistoj, kiaj Kiara, Anna, Camilo aŭ Xavi, partoprenis la lastan Junularan Esperanto-Semajnon (JES), kune kun 250 junaj verduloj el Belgio, Danio, Svedio, Nederlando, Hungario, Pollando, Germanio, Rusio, Ukrainio, Portugalio, Finnlando, Meksiko, Francio, Italio, Kanado, Ĉeĥio, Slovakio, Brazilo, Irano, Israelo, Jordanio, Usono, Japanio kaj Ĉinio, i.a.

La renkontiĝo okazis en Naumburg, proksime de la germana urbo Leipzig. Kiel kutime, kunorganizis la germana kaj la pola sekcioj de TEJO, t.e Germana Esperanto-Junularo kaj Pola Esperanto-Junularo. Jen ekzemplo de kunagado, interkomuni-

kado kaj amikeco inter du popoloj, kiuj ne ĉiam estis amikoj.

Inter la diversaj programeroj menciindas debatojn pri lingvaj rajtoj aŭ pri la rolo de Esperanto en Eŭropa Unio. Krome, estis kursoj pri Chi-Qong kaj pri meditado, kaj konkursoj prezentitaj de Giorgio Silfer pri la esperanta kulturo, kie partoprenantoj devis diveni konatajn esperantistojn kiaj Zamenhof, Privat aŭ eĉ malmodeste Silfer mem, pere de fotoj.

Elstaris du prelegoj: pri la situacio en Japanio post la nukleara akcidento en Fukuŝimo, kaj pri la pionira projekto "Springboard to languages", per kiu en di-

ESPERANTO* CAT

*Asociació Catalana d'Esperanto
Kataluna Esperanto-Asocio

Registrita ĉe "Generalitat de Catalunya" en la unua sekcio per n-ro 5785. Membro de FOCIR (Federacio de Katalunaj Organizaĵoj Internacie Agnoskitaj)

Kotizoj por la jaro 2013:
individua abonanta membro, 64 eŭroj;
pensiuloj: 50 eŭroj; individua subtenanta membro, 128 eŭroj; juna membro, 25 eŭroj.

Banko: Caixa d'Enginyers,
Agència 001, Barcelona
Kontonumero: 3025 0001 15 1433398158
IBAN: ES54 3025 0001 1514 3339 8158
UEA-konto: kaea-b
CIF: G-58338567

Plenumkomitato:
Prezidanto: Carles Vela;
sekretario: Gerard Sugranyes;
vicprezidanto: Josep Franquesa;
kasisto: Sebastià Ribes; voĉdonantoj:
Àngels del Pozo, Llibert Puig, Montserrat Franquesa kaj Ramon Perera.

Apartat/Poŝtkesto 1008
08200 Sabadell (Vallès Occidental),
Països Catalans/Kataluna Landaro
Tel. 937 109 636; Fakso: 937 163 633
Ret-adreso: info@esperanto.cat
Ret-paĝo: www.esperanto.cat



versaj lernejoj el Anglio oni enkondukas Esperanton por kuraĝigi la lernadon de la angla.

Estis kelkaj enkondukaj lecionoj pri la lingvoj pola, hungara, soraba kaj kebek-franca.

En la festa programo estis la koncertoj de La Perdita Generacio, I.D.C., Tone, Johnny M, JoMo, Ĵele, Platano, Esperanto Desperado, 42, Dijom o Danghera, i.a.. Venontjare JES okazos en Pollando.

Xavier Alcalde

KATALUNLINGVA SINDIKATO COS SUBTENAS ESPERANTON

La pasintan 2an de februaro okazis en Valencio la unua parto de la 8a Kongreso de Coordinadora Obrera Sindical (COS, "Sindikata Laborista Kunordigantaro"), kie estis aprobata referaĵo celanta lernadon, disvastigon kaj uzadon de la internacia lingvo Esperanto.

La agokampo de COS estas Katalunlingvio (orienta parto de la Iberia Duoninsulo kaj Balearoj). Pasintjare COS eldonis

katalunlingvan Esperanto-gramatikon ("gramatiketon") por komencantoj. Tiu verketo rapide elĉerpiĝis, do tre verŝajne estos reeldonata baldaŭ.

Antaŭ kelkaj monatoj COS aliĝis al Federacio Sindikata (Tut)Monda (FSM).

Jepibo

LIBROTAGO

Okaze de la librotago, Kataluna Esperanto-Asocio starigis budojn en Sabadell kaj Barcelono. La barcelona budo staris en La Rambla, samkiel en pasintaj jaroj. La vendoj estis denove rekordaj kaj verŝajne ankaŭ la disvastigo de nia afero.



KEA KONTRIBUAS EN LA OMAĜA JARO AL SALVADOR ESPRIU

Jan Petit, la okcitana trinkejo de Barcelono, plenpleniĝis la pasintan 20an de aprilo por akcepti la kontribuon de la katalunaj esperantistoj al la ĉi-jaraj omaĝoj al la poeto Salvador Espriu.

Dum iom pli ol unu horo oni legis la ĉefajn esperantigojn de la verkaro de la kataluna poeto dum granda ekrano montradis la katalunlingvan originalon.

La unua parto estis dediĉita al poemoj de la libro *La Tauroŝelo* esperantigita de Abel Montagut, kiu mem deklamis kelkajn poemojn.

La dua parto rilatis al la libro *Tombejo de Sinera*, esperantigita de Gabriel Mora i Arana. Legis la poemojn la lernantoj de la esperanto-kursoj 2012-2013.

La poemo "Provo de kantiko en la templo" rolis en tre emocia intervalo. Unue Llibert Puig legis sian premiitan tradukon. Sekvis legado de la esperantigo de Ricardo F. Albert Reyna, kiun ni transkribas ĉi-sube, fare de Teresa Marbà. Estis la unua fojo, ke Marbà legis en brajlo kaj en esperanto, ŝi estas blinda de antaŭ nelonge, kaj ĵusbakita esperantisto.

Provo de kantiko en la templo

Ho, kiel mi lacas de mia poltrona, olda, tiel sovaĝa lando; kaj kiel mi ŝatus foriri norden, kie, onidire, homoj estas puraj kaj noblaj, kleraj, riĉaj, liberaj, viglaj kaj feliĉaj! Tiam, ĉe la kongregacio, la fratuloj dirus malaprobe: "Kiel birdo nesto-fuĝa, tiel homo forlasas sian teron", dum mi jam lontane, priridus la leĝon kaj l' antikvan saĝecon de ĉi mia dezerta popolo. Sed mi ne sekvos mian revon iam; nur, ĉi tie, restos ĝis la morto. Ĉar ankaŭ mi estas tre poltrona kaj sovaĝa kaj amas, krome, kun dolor' despera ĉi tiun mian povran, ruban, tristan, domaĝan patrujon.

Tradukis el la kataluna R. F. Albert Reyna

En la budo ni disdonis flugfoliojn, ekzemplerojn de Kataluna Esperantisto, paĝindikilojn, ktp. La plej disvendita libro estis *La Eta Princo*, esperantigo de la fama libro de Saint-Exupéry.

Ĉi-jare ni devas elstarigi kaj speciale danki la grandan kvanton da volontuloj, kiuj deĵoris.

EKZAMENOJ

La pasintan 28an de majo la kandidatoj, kiuj ekzameniĝis la 20an kaj la 21an de aprilo, ricevis siajn diplomojn. Temas pri la oficialaj ekzamenoj de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) kaj Universala Esperanto-Asocio (UEA).

La kandidatoj, de la dua kaj la tria niveloj, devis trapasi ekzamenon pri gramatiko, pri parola kaj skriba kompreno kaj pri esperanto-kulturo.

En la tribunalo estis la svisino Mireille Grosjean, prezidanto de la Internacia Ekzamena Komisiono (IEK), kaj Ramon Perera, kiel prezidanto de la Loka Ekzamena Komisiono (LEK).

Kataluna Esperanto-Asocio gratulas la ses freŝe sukcesintajn diplomitojn.

Xavier Alcalde

ALTERNATIVA FOIRO EN VALENCIO

Kiel ĉiujare, valenciaj esperanto-grupoj partoprenas la Alternativan Foiiron de Valencio, kiu de antaŭ pluraj jaroj okazas en la eksrivero, inter la ponto de Les Flors kaj la ponto de L'Exposició. La foiro kunigas multajn sociajn kaj politikajn projektojn, metiistojn, budojn pri ekologia manĝo kaj en ĝi okazas ankaŭ diversaj prelegoj kaj atelieroj.

Ĉi-jare kundividis budon la sindikato COS, anaro kontraŭ la privatigo de la publika sanservo, kaj kelkaj esperanto-grupoj de Valencio kaj de la kooperativo tutmonde.org. Estis tre bona etoso kaj granda partopreno.

Tiaj iniciatoj estas tre pozitivaj, ĉar ni alproksimigas la internacian lingvon Espe-



ranto al la publiko kaj al la sociaj movadoj de la foiro, kiuj ofte partoprenas en internaciaj anaroj kaj kiuj klare vidas la utilon (kaj la neceson) de internacia neŭtrala lingvo.

Venontjare ni reiros, eĉ kun pli da emo.

Joan Català

ENTUZIASMIGA RENKONTIĜO EN OLIVA

Kvindeko da homoj el tre diversaj aĝoj partoprenis la Valencian Esperanto-Renkontiĝon okazinta en Oliva la pasintajn 21an, 22an kaj 23an de junio.

La partoprenantoj –venintaj el la tuta lando, la ŝtato, kaj eĉ el Germanio kaj Italio– ĝuis freŝan perspektivon de la internacia lingvo en tre agrabla somera etoso. La junaj organizantoj atingis kontaĝi sian energion kaj entuziasmon en tre diversaj programeroj, kiel surplaĝa volejbala matĉo inkuzivanta malstreĉigan gimnastikon, kompleta kaj amuza vizito al la valencia urbo, emocia aera surprizo aŭ peĉakucado, t.e. serio de tre mallongaj prelegoj.

Krome, la partoprenintoj reliefigis la gastronomian kvaliton de la renkontiĝo, kie tradicia rizo ne mankis. Rilate al kulturaj aspektoj menciindas, ke Pere Fornells, Maria Dolores Godoy kaj Alfons Tur meritoplene gajnis la premion en tre konkura konkurso pri poezio en la kataluna kaj en Esperanto. Ana Manero kompletis la literaturan vesperon per legado de poemoj de la Ibera Skolo. En tiu evento oni prezentis la novan asocion, Valencia Esperanto-Asocio, kiu naskiĝas kun la celo grupigi la esperantistojn de Valencilando.

Xavier Alcalde



KURSOJ EN BARCELONO

En la kurso 2012-13 formiĝis grupo de sep komencantoj, kiuj renkontiĝis ĉiusemajne en nia oficejo de konstruaĵo CIEMEN. La grupo, gvidita de Viktoro Solé, bone evoluis kaj ĉiuj gelernantoj atingis sufiĉe bonan nivelon fine de la kurso. Du el ili eĉ partoprenis la Someran Esperanto-Studadon en Slovakio por daŭrigi sian lernadon.

La instruisto enkondukis novan helpilon, kiu nomiĝas Mansignado por Esperanto, kies celo estas helpi la novajn esperantistojn analizi pli bone la lingvon dum ili parolas kaj, tiamaniere, ekzemple, ne forgesi (tiel ofte) akuzativon.

La kursanoj ne nur partoprenis la regulajn lecionojn, sed ili ankaŭ ĉeestis esperantajn aranĝojn, kiel la viziton al la Muzeo de Subirats, la zamenhofan tagon, la budon de Sant Jordi, kaj kelkaj el ili eĉ recitis poemojn de Salvador Espriu en la Omaĝo al tiu poeto, kiun ni solenis printempe. Fine de la kurso, tiuj gelernantoj ankaŭ partoprenis la mardan konversacian rondon en Centre Artesà Tradicionàrius de la barcelona kvartalo Gràcia, kie ĉiusemajne renkontiĝas grupo de pli spertaj esperantistoj.

Viktoro Solé

CURSOS D'ESPERANTO A BARCELONA 2013-2014

- ▶ **Nivell inicial:**
Dimarts de 18h30 a 20h00
- ▶ **Nivell avançat:**
Dijous de 18h30 a 20h00
- ▶ **A La Violeta de Gràcia**
C/ Maspons 6-8
VILA DE GRÀCIA
- ▶ **Grups de conversa:**
Dimarts de 19h00 a 21h00
a la Taverna del CAT

www.esperanto.cat

36a KATALUNA KONGRESO DE ESPERANTO

+

1a OKCITANA KONGRESO DE ESPERANTO



Salardú (Val d'Aran)
1, 2, 3 de novembro 2013

www.esperanto.cat
